Czesław Miłosz,

# Vi forta nokt'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi forta nokt', al vi ja etendiĝas
nek ombro nek nubar' nek incendi';
vi lumas, kvazaŭ hela tago iĝas.
Dormante vian voĉon aŭdas mi.

Vi estas nokt'; en am' kun vi kuŝante
estontajn bataladojn vidis mi.
La plebo ne rimarkas ĝin dormante.
Eksonas vitreriĝa melodi'.

Potencaj malamikoj estas ĉie.
Amata, vi fidelas al la ter'.
La vento pelas nigran branĉon ie,
el obskurejo blovas la aer'.

En viaj molaj manoj, vi Mortiga
boneco ega estas kaj saĝec'.
Ekbrilas iu lumo pliheliga,
ne disvolviĝis jam de l' lun' plenec'.

*Traduko de la Pola poemo "Ty silna noc" de* CZESŁAW MIŁOSZ *(∗1911-06-30 – †2004-08-14) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1903-06-14.*

*MR-064-1 / Arg-739-1493 (2012-12-30 11:59:37)*

*Pri la poeto vidu la vipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Czes%C5%82aw_Mi%C5%82osz.